




Boletín

de la Federación Española de Esperanto



S-ro Salvador Gumá fariĝis Honora Membro de HEF



N-ro 314 - JANUARO - FEBRUARO - 1994

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Aperanta de 1949

Ĉefredaktoro

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe 27-29, 9^o C
ES-50002 Zaragoza

Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell
Miguel Fernández Martín
Vicente Hernández Llusera
Andrés Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Valén Fernández

Federación Española de
Esperanto
(Información y administración)

Hispana Esperanto-Federacio
(Informado kaj administrado)

Rodríguez San Pedro 13-3^o-7
ES-28015 MADRID
Telefono + faksilo: +34-(9)1-446-80-79

Estraro

Prezidanto: Antonio Alonso Núñez
Sekretario: Marcos Cruz Martín
Vicprezidanto: José M^a Galofré Domingo
Vicsekretario: (provizore vaka)
Kasisto: José M^a Bernabeu Franco
(Konto: 14.011.966 de Caja Postal)

Kovrilo: S-ro S. Gumá, honora membro de HEF, ricevas de J.M. Galofré, Vicprezidanto de HEF, memorigan metal-platon.

Nota: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

ENHAVO

6La modernigo de la e-movado en Hispanio <i>A. Marco</i>	3
Realisma kongreso <i>Andrés Martín</i>	5
Nia kongresurbo: Malago <i>Andrés Martín</i>	7
Vidindaĵoj en Malago	10
Nekrologo	11
Provizora programo	12
Viglas la movado	14
Libroservo (ofertoj)	16
Omage al la forpasinta Inés Gastón <i>Salvador Gumá</i>	18
Ĝia mostino la litero "N" <i>Luis Serrano Pérez</i>	19
La ĝemelaj radikoj "spekulaci-" kaj "spekulativ-" <i>Bernard Golden</i>	20
Zamenhof-tago	21
Universalismo, naciismo kaj esperantismo <i>Rafaela Urueña/Luis Hernández</i>	22
La ŝulca lingvo <i>Georgo Kamaĉo</i>	24
Alvoko al niaj membroj	28
Informoj pri loĝado en Malago	29

Modernigo de la E-movado en Hispanio

Por neniu veterana esperantisto ekzistas eĉ plej eta dubo, ke la hispana E-movado funkcias impulsata de amatoreco kaj bonvolo, kaj ĝuste tial la forto kaj nivelo de nia movado ĉiam dependas de la ofere-mo, laborkapablo kaj inteligento de kelkaj malmultaj individuoj gvidantaj ĝin. Brilis/brilas la movado dum la periodoj kiam elstaraj homoj aktivas. Stagnas aŭ regresas kiam la intelekta nivelo kaj fervoro de la gvidantoj estas malaltaj. Aliaj elementoj politikaj kaj sociaj ankaŭ influas la malvolvon de la movado. Ŝajnas, ke tiuj bazaj elementoj ĝis nun validaj eniris en krizon kaj postulas renovigon.

Mi estas esperantisto de la jaro 1937. Tio tute simple signifas, ke mi havis la okazon vivi brilajn horojn de nia tutlanda movado kaj aliajn ne tiom helajn; tial ŝajnas prudente ne lasi ke sukcesa aŭ malsukcesa evento trompu nin por tuj proklami nian gloron aŭ nian ruinon. Atenta analizo de la situacio emigas nin pensi, ke ni ne estas nun antaŭ unu el tiuj sporadaj krizoj, kiujn ni de tempo al tempo suferis, sed antaŭ problemaro pli serioza.

Aperas kiel unuaj kaŭzoj de nia stagnado aŭ regreso certaj ŝanĝiĝoj de homaj valoroj en nia socio. Evidenta krizo de idealoj ĉe la



aktuala homo kaj sekve malfortiĝo de tiu antaŭa ofere-mo de tiom da voluntuloj, kiuj sindoneme kaj senlace laboris por Esperanto. La sekvoj de tiuj ŝanĝiĝoj estas la malkresko de membroj en niaj asocioj kaj grupoj, grava malriĉiĝo de niaj rimedoj kaj la povra reago de la civitanoj al niaj alvokoj por lernado de la internacia lingvo. La estraro de HEF, konscia pri tiu delikata situacio, studas jam de antaŭ longe novan strategion por solvi niajn problemojn: en la lasta estrarkunsido, okazinta antaŭ kelkaj semajnoj en Madrido, ĝi decidis kunvoki kunvenon de prezidantoj de hispanaj grupoj aliĝintaj al la federacio por debati nian problemaron kadre de la venonta kongreso okazonta en Malago. Tio tute ne signi-

fas ke nia situacio estas tiel katastrofa, kiel kelkaj el niaj kolegoj pretendas, tamen ŝajnas neeviteble adopti novan politikon pli kongruan kun nia socia realo. Aprioraj studentaj temoj povas esti:

- ★ Urĝa eldono de moderna E-gramatiko por komencantoj.
- ★ Kampanjo por varbi novajn membrojn.
- ★ Duonprofesieco por instruado de E-o.
- ★ Starigo de tutlandaj kursoj de E-o perkorespondaj.
- ★ Televida kurso.
- ★ Konformigo de senprofitcela asocio en instrumento por financi niajn ekonomiajn bezonojn.
- ★ Starigo de Eldona Komisiono por raciigi niajn publikigaĵojn, ktp.

Laŭdinde, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jam reagis en tiu direkto kaj ne nur publikigis plurajn artikolojn en tiu senco, sed ankaŭ proponis starigi tri laborkomisionojn, kiuj okupiĝos en konkretaj temoj se la kunvenontaj prezidantoj interkonsentos pri tio. HEF, ekster sia institucia propono, instigas niajn E-Grupojn prezenti novajn sugestojn kaj ambiciajn planojn por atingi niajn celojn.

Ni havas la esperon, ke la proponitaj debatoj donos pozitivajn rezultojn en la venonta kongreso. Mi ne povas eviti mencii sen laŭdo la pasintan kongreson okazintan en Merido, kiam junaj valoroj kongresis kun la pli aĝaj esperantistoj kaj dank' al ilia kontribuo ne nur riĉiĝis

niaj kunsidoj sed oni ricevis la impreson, ke la kutima bildo pri kongreso konsistanta el simpla administra asembleo de HEF, prelegoj kaj ekskursoj ne plu sufiĉis por niaj bezonoj kaj ambicioj. La konscio, ke gravaj problemoj pri instruado, financoj, eldonoj, ktp. postulas pri studojn kaj decidojn, devigis tiam la HEF-estraron promesi ke "en venontaj kongresoj oni starigos laborgrupojn por pristudado kaj eventuala solvo de tiuj problemoj". Kongrua kun tiu anoncita politiko, ni konstatas nun kun fiero kaj danko, ke la Malaga OKK jam anoncis sian intencon organizi kaj aktive kontribui en tiuj aranĝoj.

Kun modera optimismo, HEF ripetas sian dankon al tiuj HEF-anoj, kiuj okaze de la UK pasintosome en Valencio montris elstaran laborkapablon kaj unuavican rangon en la organizaj, beletraj kaj eldonaj taskoj, kaj ankaŭ al tiuj, kiuj strebis por ke nia Asocio ricevu de la hispana registaro la agnoskon, kiel Asocio kun Publika Utileco. Nun, novaj aspiroj postulas nian komunan kunlaboron: ni instigas niajn membrojn, ne nur al simpla partopreno en la Malaga kongreso, sed precipe al kontribuo igi tiun jarkunvenon mejloŝtono en la grava tasko pri aktualigo de niaj strukturoj kaj modernigo de la Hispana Esperanto-Movado.

Antonio Marco Botella

KOREKTO

La abono al *Literatura Foiro* kostas ne 3.500 sed 3.800 poŝtoj.

Realisma Kongreso

Cele al plej sukcesiga aranĝado de la venonta Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio estas necese determini la limojn de la agado realigota kaj, samtempe, ebligi liberan kaj respondecan partoprenon de ĉiu kongresano. Tial, OKK, per ĉi tiu dokumento, havigas al ĉiuj samideanoj la jenajn rimarkojn:

Pravigo

A) Gravaj aktivuloj en Esperantujo konscias la danĝeran situacion de la E-movado en Eŭropo post la rapida malapero de la influo de la esperantaj organizoj en landoj de Orienta Eŭropo, kies registaroj ĉesis subteni nian internacian lingvon antaŭ nelonge. Tiu cirkonstanco instigas tieajn aŭtentikajn kaj kuraĝajn samideanojn pripensi novajn strategiojn por, ne nur pluvivigi e-on en siaj landoj, sed por plifortigi ĝin per adekvata adaptado al la novaj tempoj.

B) En nia lando same kiel, ĝenerale, en aliaj okcidentaj landoj, la e-movado maljuniĝas progresive. Se la aktuala generacio de esperantistoj ne sukcesas entuziasmigi la hispanan junularon per konkretaj kaj allogaj programoj realigotaj helpe de e-o, la hodiaŭa rekono —ja malgranda— de nia lingvo flanke de la socio tute malaperos. Kaŭze de tio, estas necese okazigi kongreson en kiu oni studu ĝisfunde la nunon de e-o en Hispanio cele al startigo de nova agadmaniero pli sukcesiga.

Baza idearo

E-movado similas al arbo kiu, principe, produktas fruktojn. Kiel ĉi tiu ĝi havas radikojn, trunkon, branĉojn kaj foliojn. Por produkti fruktojn ĝi bezonas nutriĝi akorde kun sia naturo kaj tiom ĝi eltenas la ventegajn kaj ŝtormajn atakojn, kiom ĝi estas enradikiĝinta en la grundo. La nutraĵo de la e-movado estas ties ideologio. La fruktoj de la e-movado konkretiĝas en la aplikado de la lingvo.


Sen idearo, neniu organizo eltenas la tempopason. Nu, en nia kazo, la INTERNA IDEO estas io fundamenta.

La kvalito kaj la kvanto de la fruktoj dependas de la nutraĵoj kaj de la forteco de ĉiu el la partoj de la arbo.

Kvante kaj kvalite la aplikado de e-o dependas de la travivado de la Interna Ideo kaj de la forteco de la e-organizoj.

La nuno

Jen iuj el la faktoj kiuj determinas nuntempe la e-movadon en Hispanio:



- La ŝtata registaro apenaŭ kunlaboras kun la e-organizoj.
- La politikistoj estas pretaj subteni iun esperantan agadon, nur se ili konjektas atingi per ĝi gravan pliiĝon de sia prestiĝo; ili ne konscias la gravecon de nia agado nek la lingvan internacian problemon.
- Neniu politika partio kuraĝas defendi e-on publike kaj oficiale en Hispanio.
- Kvankam en niaj vicoj troviĝas personoj (bedaŭrinde, malmultaj) tre kleraj, oni apenaŭ sukcesas engaĝi aliajn en la Movadon.
- 99,999% el la hispanoj (esperantistaj kaj neesperantistaj) opinias, ke e-o ne utilas por perlabori la panon.
- Preskaŭ ĉiuj niaj samlandanoj ŝatas e-on kiel nuran esprimon de iu bela, sed neniam atingota, homaranisma revo.
- Malmultaj hispanoj lernas e-on kaj granda procento el tiuj forlasas ĝin konstatinte la endemian stagnon de la e-movado.
- Kvankam ni ĉiuj konscias la malfortan efikon de niaj kongresoj kaj renkontiĝoj, nur iuj kuraĝas ŝanĝi ilin; la aliaj aliras ilin precipe -aŭ ekskluzive- por amuziĝi kaj revii.
- La fanfaronado de multaj esperantistoj estigas mokojn de la ceteruloj.

La estonteco

Ne nur eviti la ruiniĝon de la e-movado, sed ankaŭ pliiĝi la efikon de nia internacia lingvo estu nia kongresa celo. Estas urĝe eltrovi novan kaj pli

efikan agadmanieron en la venonta kongreso de HEF. Kvankam OKK ne intencas altrudi kriteriojn al la ceteruloj, ĝi opinias, ke en Malago estas nepre:

A.- Pristudi la realajn eblecojn enkonduki e-on en: la ekonomian kampon; la lernejojn; la amskomunikilojn.

B.- Konkludi konkretan kaj realisman agadplanon por

- engaĝi klerulojn al la e-movado;
- kuraĝigi samideanojn uzi e-on en siaj negocoj;
- kunlabore de samideanoj krei kaj funkciigi pioniran entreprenon per kies profito oni subtenu ekonomie e-on en Hispanio;
- startigi rimedojn por altiri klerulojn kaj kun ilia kunlaboro partopreni aktive en lernejoj kaj amaskomunikiloj.

C. Adopti pli efikan strukturon de la e-movado por kunigi fortojn kaj penojn cele al la aplikado de la konkludoj atingitaj en ĉiu HEF-a Kongreso.

Andrés Martín González

ĈI SOMERE

Nia kongresurbo: Malago

Kiel la ceteraj partoj de Andaluzio, Malago integriĝas al la mediteranea civilizacio ekde la Neolitiko.

Laŭ Strabono, la fenica Malago (Malaka) estis urbo-faktorio kies desupra plano estis poligona. Ŝajne, la fenicoj konstruis ĝin ĉirkaŭ la monteto kie hodiaŭ situas la alkazabo; sur la montdeklivoj de Gibralfaro ili lokis siajn industriojn por preparado de purpura tinkturo kaj de fiŝpeklado (tekniko kiun ili tuj lernis de la praloĝantoj).

Malaka atingis plenan urban maturecon en la romana regado. Tion pruvas la ruinoj de la grandioza teatro de la respublika epoko eltrovita en 1951.

Dum la visigota regado, kaj kaŭze de la disrompiĝo de la romana mondo, la ekonomio kaj precipe la komerco de la provinco dekadencis videble. Nur dum la mallonga okupacio bizanca oni travivis mallongan ekonomian reagon en Malago-provinco.

En 1487 Malago, defendite de Hamet El Zegrí, estis konkerita de kristanoj.

Malago kaj ĝia provinco suferegis pro la politikaj revolucioj de la tumulta 19a jarcento. La napoleona invado, en kies malvenko ĉe Bailén (1808) partoprenis la malagaj geriloj organizitaj de la gubernatoro Reding, alvenis al Malago-urbo en 1810.

La urbo estis drama atestanto de la politikaj ŝanĝiĝoj kaj postaj ribeloj okazintaj tuj post la reveno de Ferdinando la 7a kaj la sekva abolicio de la Kadiza Konstitucio. La ribelo de Riego (kiun rifuzis en Malago la absolutisma garnizono, sed triumfis en la tuta lando (1820-1823) estas la unua el longa serio. En 1831, en plena absolutisma dekadenco, oni mortpafas sur la strando San Andrés la liberalan Torrijos kaj liajn kunulojn, kiuj antaŭ ne multaj tagoj elŝipiĝis proksime de Fuengirola kredante ke la Malaga garnizono subtenos ilian klopodon estigi liberalan konstitucion en la lando; en 1836 okazas en la provinco pluraj ribeloj kontraŭ la reĝa statuto; en 1856 Malago ribelas kontraŭ la Liberala Unio: en 1868 ĝi partoprenas en la "Gloriosa" kaj, poste, travivas la tumultajn okazintaĵojn de la 1a Respubliko kaj la Kantona Insurekcio.

Ekde 1824, kaŭze de malpermeso komerci kun aliaj landoj per la granada haveno de Motril, la haveno de Malago ricevis favoron. Malago estis inter la unuaj urboj el Hispanio kiuj rekomercis kun la sendependa Ameriko. De ĝia haveno oni eksportis denove la malagajn vinojn, la citrusajn fruktojn, rosinojn kaj aliajn sekigitajn fruktojn, sukeron, ktp.

La senposediga proceso atingis ankaŭ la provincon kaj kaŭze de tio oni aliproprigis multajn monaĥ(in)ejojn. Grandaj malagaj familioj kiel Larios kaj Heredia, helpegis estigi grandajn industriojn kaj negocojn kiel sukerrafinejojn, fabrikojn de teksaĵoj, vinkelojn, ŝipkonstruejojn kaj eĉ fandfornojn, unuajn en Hispanio kaj akordajn kun la ekanta ferindustrio.

Ekde la mezo de la 19a jarcento, multegis la strukturaj problemoj de la andaluzia socio:

1. La Eklezio perdis grandparte sian influon sur la popolon kaŭze de sia evidenta subteno al absolutismo.
2. La deziro de grundo, endemia en Andaluzio, drame montriĝis en la banditgrupoj kiuj de la fino de la Sendependa Milito agadis en la provinco.
3. La anarkiismo forte montriĝis dum la Kantona Insurekcio.

4. La malagano Blas Infante, tutcerte la plej granda lidero de la andaluziismo, estis la plej grava propagandisto de la nacia idearo (lia verko "El ideal andaluz" eldoniĝis en 1915) kaj en 1918 okazis en Ronda la Unua Andaluza Kongreso, en kiu denove oni alproprigis la depostulojn de la kantonismo kaj oni aprobis la verdblankan flagon, la blazonŝildon kaj la himnon de Andaluzio.

La provinco suferis ĉefe pro la terurega filokserplago kiu detruis grandparte la vitejojn inter 1878 kaj 1898. En 1884 grava tertremo okazigis grandajn perdojn en Axarquía. La senkapitaligo de la banko de Malago, la manko de minerala karbo kaj la teknologia malprogreso kiuj provokis la fermon de la fandfornoj, la malgranda rentumo de la fervojo Malago-Kordovo, la malekvilibroj pro la posedo de la grundo, ktp. estis kelkaj el la damaĝaj problemoj kies solvo markis la diversajn sociajn grupojn en la unua triono de la 20a jarcento.

La puĉo okazinta la 18an de julio 1936 dividis Andaluzion en du partojn: la okcidentan, baldaŭ regatan de Franco, kaj la orientan kiu obeis la respublikan registaron. Malago-ĉefurbo estis defendata de la popola milicio, sed atakata de la 5a ĝis la 13a de februaro 1937 de italaj trupoj (Corpo Truppe Volontarie de la itala generalo Roatta) kaj intense bombardata, la urbo suferis gravajn damaĝojn. La hororoj kaj detruoj dum la intercivitana milito tre influis la vivon en la Malaga-provinco. La subpremado estis kruelega. Blas Infante estis mortpafita la 10an/11an de aŭgusto 1936, kune kun multaj aliaj malaganoj apartenantaj al maldekstraj partioj kaj sindikatoj, kaj post la milito Malago suferis longan etapon de ekonomia stagno. Post tiuj teruraj jaroj de aŭtarkio venis la apogeo de la turismo en la kvindekaj jaroj kiu donis rangon internacian al multaj malagaj urboj: Torremolinos, Marbella, Fuengirola, Estepona, Benalmádena kaj Malago mem.

La agrikulturo suferis gravan krizon, kiun okazigis la elmigrado de kamparanoj al la ĉefurbo. Nun la troa sezoneco de la turismo grave malekvilibrigis la malagan ekonomion, kiu preskaŭ ekskluzive dependas de la turismo.

Andrés Martín



Vidindaĵoj en Malago

Notoj pri vidindaĵoj de artaj historiaj malagaj monumentoj

ALCAZABA (Alkazabo): Verŝajne ĝin ordonis konstrui Abderamano la 1a en la jaro 787, kaj pligrandigis ĝin la kordova kalifo Abderamano la 3a. La remparoj (el ŝtonoj kaj brikoj) havas kvadratajn turojn. Nuntempe ĝi estas restaŭrata kaj plibeligata.

GIBRALFARO: Duobla vico de remparoj unuigas ĝin kun la alkazabo. Gibralfaro situas en la pinto de monteto. Temas pri fortreso kiu, siatempe, enhavis cisternojn por 5.000-homa garnizono.

DOMO "PICASSO": La domo kie naskiĝis tiu mondfama artisto situas en placo La Merced.

KATEDRALO: Oni komencis konstrui ĝin en 1528 kaj oni elkonstruis ĝin en 1782. Temas pri arkitekturo regita de klasikaj kriterioj kiujn oni adaptis al tipa gotika desupra plano.

PREĜEJO "EL SAGRARIO": Grava ekzemplo pri malfrua gotika arto. Ĝi estis konstruita sur la ĉefmoskeo. Admirinda retablo de Juan Balmaseda.

PREĜEJO "SAN JUAN": Baroka arto.

PREĜEJO "SANTIAGO": Ĝi havas mudeĥaran sonorilturon. La interna dekoracio de la preĝejo estas baroka, kiel ties retablo.

PREĜEJO "LOS MÁRTIRES": Ekstere la konstruaĵo estas tute simpla. Interne, la baroka lukso de la navoj estas okulfrapa. Gipsaj ornamoj orumitaj sur muroj kaj volboj altiras la atenton de la vizitantoj.

PREĜEJO "NUESTRA SEÑORA DE LA VICTORIA": La Katolikaj Reĝoj ordonis konstrui ĝin por memori la venkon de kristanoj kontraŭ muzulmanoj. Elstaras la navoj pro la stuka dekoracio (andaluzia baroko).

Aliaj vidindaĵoj

Malagaj ĝardenoj: La plej gravaj situas en El Parque, Puerta Oscura, la Cónsula, El Retiro, San José kaj La Concepción.

Belvederoj: Mirador de Mijas (1150 m. super la marnivelo) kaj Balcón de Europa (en Nerja).

Kavernoj: Tiuj de Nerja kaj Rincón de la Victoria.

Ĉefaj artaj stiloj en Malago

a) Mudeĥaro: Ĝi aperas post la venko de la Katolikaj Reĝoj kontraŭ muzulmanoj. Restaĵoj: preĝejoj kaj monaĥ(in)ejoj.

b) Manierismo: Termas pri la malaga ora jarcento. Impona influo de la italaj manieristoj Serlio, Palladio, Vignola, Alberti, Cesare Arbassia kaj Luca Cambiasso.

c) Baroko: Karakterizas ĝin prefero por la kurbaj linioj kaj malsimplaj ornamaĵoj. Ekzemploj: retabloj, bildoj, torditaj akantoj, anĝeloj, abundokornoj, girlandoj kaj kornicoj.

ĉ) Novklasikismo: Elstaras en Malago la skolo de pentristoj kreita en ĉi tiu urbo ĉirkaŭ la Escuela de Bellas Artes.

NEKROLOGO

Pro subita cerboatako forpasis en Zaragozo la 26an de decembro 1993 la veterana esperantisto ANGEL SALETE TEJERO, 82-jara, aktiva fidela membro de "Frateco" kaj de HEF, gvidanto de kursoj dum multaj jaroj, nelacigebla batalanto por nia afero. Funebras do la zaragoza esperantista movado. Li pace ripozu!

Ni kondolencas lian familion pro tiu dolora perdo.

La Redakcio

Reklamtarifo de Boletín

Kvarona paĝo	2000 ESP
Duona paĝo	3000 ESP
Tuta paĝo	5000 ESP

Manieroj pagi:

1) per HEF-konto ĉe UEA (hefb-m).

2) per HEF-konto ĉe hispana ŝparkaso Caja Postal (0014011966)

Bonvolu sendi la pretan originalon aŭ la (prefere surdiskan) tekston al la HEF-oficejo, kun pagpruvilo.

PROVIZORA PROGRAMO

La Kongresejo (Centro Cívico. Av. de los Guindos, 48. Urbanización "Santa Paula") situas ĉe plaĝo, kaj atingblas per la bus-linioj: 15 kaj 16.

TAGO	HORO	PROGRAMERO
16a (sabato)	10	Disdonado de kongresdokumentoj
	12,30	Malfermo de la Kongreso
	16,30	Asembleo de HEF (1a parto)
	19	Arta Ludado (Dancoj)
17a (dimanĉo)		Tuttaga ekskurso
	10	Laborkunvenoj
		Klasoj (esperanto, dancoj)
	16,30	Asembleo de HEJS
18	Klasoj (esperanto, dancoj)	
18a (lundo)	10	Laborkunvenoj (tutan matenon)
		Klasoj (esperanto, dancoj)
	10,30	Vizito de Malago
	16,30	Asembleo de asocioj
18	Klasoj (esperanto, dancoj)	
19a (mardo)		Libera Tago por ne membroj de Komisionoj
	10	Laborkunvenoj (tutan matenon)
		Klasoj (esperanto, dancoj)
	16,30	Prelego
18	Laborkunvenoj (Konkludoj)	
20a (merkredo)		Tuttaga ekskurso
21a (ĵaŭdo)	10	Asembleo de HEF (2a parto)
	12	Koncerto
	13	Fermo de la kongreso
	14	Kongresa tagmanĝo, kaj adiaŭo.

1. Temo de la Kongreso: *La esperantigo de la socio.*

2. La estraro de HEF en sia kunsido en Madrido (13-11-93) decidis kunvoki, en la kadro de la Malaga Kongreso, kunvenon de prezidantoj de hispanaj asocioj kaj grupoj, por studi ilian problemaron kaj sekve starigi la bezonatajn specifajn komisionojn, kiuj prilaboros dum la kongresaj tagoj novan pragmatan planon por eltiri niajn grupojn el la nuna krizo.

Tiurilate, "Andaluzia Esperanto-Unuiĝo" jam proponis starigi tri laborgrupojn, nome:

- a) Aplikado de Esperanto en la ekonomia kampo.
- b) Instruado de Esperanto.
- c) Esperanto kaj la amaskomunikiloj.

3. HEF oficiale invitos la Prezidantojn de ĉiuj Grupoj kaj Asocioj al komuna debato pri la nuno kaj la estonteco de la hispana Esperanto-movado, kadre de la 53a Kongreso en Malago. Tial, la Asocioj kaj Grupoj preparu dosieron klarigantan siajn mankojn, aspirojn, problemojn kaj eventualajn solvojn, kaj sendu ĝin al la Centra Oficejo ĝis la 30a de aprilo, por ke la Sekretario preparu ampleksan dosieron uzotan en la kunveno de Malago.

4. La kunveno de prezidantoj decidis dum la unua Asembleo de HEF kiom da temoj estos submetataj al studo de la laborkomisionoj, kaj elektos la koncernan responsulon por ĉiu el ili.

5. Dum la Asembleo de HEF (2a parto) ĉiu prezidanto aŭ responsulo de laborgrupo prezentos al la kongresanaro siajn respektivajn konkludojn, pri kiuj la HEF-membroj decidis.

6. Ĉiu Laborkomisiono konsentos pri sia propra horaro, laŭ enverguero de la farota tasko.



malnovaj numeroj de Boletín: po 200 ptojn ekzemplero



Viglas la movado

Zarautzo

Same kiel la pasintan jaron (vd. "Boletín", n-ro 309, jan-feb. 1993) Eŭska Esperanto-Asocio sukcese aranĝis du-nivelan rapid-kurson de nia lingvo (instruistoj: Rafa Blanco kaj Antonio Valén, ĉi-foje kun ĉ. 25 partoprenantoj. Lernanto de la lasta kurso okazinta en Zarautzo sendis al ni jenan noton por eventuala publikigo en nia revuo:

"Kial vi ne estis en Zarautzo? Se vi ŝatas paroli (eĉ babili) en Esperanto kaj vi estas pli-malpli junulo, mi ne scias kial vi ne ĉeestis en Zarautzo okaze de Esperanto-kurso organizita de Eŭsko Esperanto-Asocio: la instruistoj estis tre bonaj kaj ankaŭ tre bonaj estis la lernantoj. Ni ne nur lernis Esperanton sed ankaŭ ridis, kantis kaj promenis, kaj kelkaj el ni eĉ drinkis la faman eŭskan vinon. Ĉiuj ĝuis la kurson, ĉar kiuj ne ŝatas vinon kaj preferis dormi, faris tion tute malstreĉe, sen kapdoloro. Matene ili praktikis jogon kaj kelkaj el ili banis sin poste en la maro (nekredeble, sed certe). Ni adiaŭis nin per sama saluto, kvazaŭ promeso: "Ĝis la venonta kurso!"

Lorenzo Mediano.

Alquerias

Je la kursokomenco 1993-94 okazis en tiu urbeto apud Murcio la inaŭguro de la nova sidejo de Kultura Asocio "Ĉielarko" (Esperantista Grupo de Alquerías). Donis brilon al la solenaĵo sub la prezido de samideano Francisco Muñoz Garre, la skabeno pri Kulturo de la Urbestraro de Murcio, s-ro Oñate Marín, kaj la reprezentanto de HEF samideano José María Bernabeu. Oni malfermis la "3an Kulturatan Semajnon" konsistantan en riĉenhava kaj interesa programo, en kiu saĝe oni miksis kulturon kaj amuzon. La organizantoj prezentis "Esperantistan Ekspozicion" per materialo de la Libro-Servo de HEF kaj fotoj kaj artikoloj publikigitaj de la murciaj ĵurnaloj koncernantaj al eventoj pri la Esperanta Grupo de Alquerías ekde la jaro 1979, kiam ĝi estis fondita.

Gravas substreki, ke tiu Esperantista Grupo de Alquerías estas unu el la plej aktivaj en nia lando, ĉar, krom la E-kursoj, ĝi ankaŭ ofte organizas prelegojn, beletrajn kaj sportajn konkursojn, turismajn vojaĝojn al eksterlando kaj... kio plej surprizas, tio estas ĝia enviinda ekonomia bona sano.



Sinceran gratulon al la prezidanto de tiu ĉi modesta sed vigla E-grupo, samideano Francisco Muñoz Garre!

Sabadell

Konciza historio pri tiu ĉi urbo, kun siaj 43 precipaj interesaj lokoj, komunikreto kaj mapo troviĝas en triptiko ĵus eldonita de tiurba Magistrato, kiu publikigis ĝin en du apartaj eldonoj, t.e. en kataluna kaj kastilia lingvoj. Inter ĝiaj 10 elektitaj kolorbildoj distingiĝas parta perspektivo de la Bulvarado Zamenhof, kun la monumento al la Majsstro. Sub tiu bildo jenas la teksto:

"Sabadell dediĉis al la kreinto de Esperanto unu el siaj plej gravaj stratoj, nome la Bulvardon Zamenhof, kie situas ankaŭ la Monumento al la aŭtoro de la Universala Lingvo"

Premio "Klara Silbernik" 1994


Kadre de la 54a Hispana Kongreso de Esperanto, nunjare okazonta en la urbo Malago, tiun Premion oni transdonos al s-ino Pilar Gayarre, el Zaragozo, pro ŝia konstanta apogo al sia edzo, s-no Antonio Marco Botella, en lia plurfaceta strebado por Esperanto, daŭre plenumata de

LIBROSERVO DE HEF

ofertas al la hispanaj esperantistoj abundon da libroj, diskoj, kasedoj, vidbendoj, glumarkoj, ktp.

Petu senpagan ekzempleron de ĝia Katalogo.

★ HEF: BONAĴ SERVOJ ★



LIBROSERVO

983-260086

telefona aŭtomata respondilo

MENDEBLAS JAM!

La lasta verko de la plej brila esperanta prozisto, Georgo Kamaĉo:

La Majstro kaj Martinelli

Kompreneble, ankoraŭ haveblas lia sukcesa verko Sur la linio.

ATENTU LA OFERTOJN

Ibere libere	2.500
Poemo de Utnoa	3.255
Sferoj-8	1.000
Cigana romancaro	545
La arbo de la sciado	1.475

SUPEROFERTO

Tirano Banderas	1.000
---------------------------	-------

Sendube... unikaĵoj!



HEF (91)-446-80-79

24 horojn tage, respondile kaj faksile.
Persone: marde kaj ĵaŭde de 18a ĝis 20a

kiam li komencis aktivadi kiel ĵusa esperantisto, jam en la jaro 1937.

Kvankam nun ne estas nia celo detale raporti pri la diversaj kampoj de la esperanto-movado, en kiuj s-ro Marco Botella rimarkinde distingigis-as, ni ne povas ne menciĝi tie ĉi lian duoblan, tre respondecan taskon efike redaktadi du gravajn Esperantolingvajn revuojn, nome "Boletín" kaj "Kajeroj el la Sudo", kiujn li prestiĝigas per sia serioza kaj kompetenta redaktado.

En la nomo de la organizo KAE, nian anticipan gratulon al la geedzoj Gayarre-Marco.

Latvia internacia printempo

Latvia Esperanto-Asocio invitas niajn legantojn ĝui printempon en Latvio, ĉe Baltia maro, por konatiĝi kun moroj de latva popolo kaj la plej belaj lokoj de tiu lando.

Provizora Programo:

- Historio de Latvio, rilatoj inter diversaj nacioj en Latvio, latva nacia religio de pratempoj.
- Komencantoj povus lerni Esperanton laŭ Ĉe-metoda kurso.
- Per ekskursoj vi povos konatiĝi kun Riga, Jurmala, k.a.
- Viaj proponoj estos bonvenaj.

LIP-94 okazos en Kongrescentro de Latvia Scienca Akademio, de la 29-4- ĝis la 2-5-94, kie estas rezervitaj lokoj kaj por la laboro, kaj por

loĝado. Kontaktadreso: LEA, a/k 150, Latvio, 1050.

Caracas. Jarkunveno de VEA


Je la fino de novembro pasintjare, okazis la ĉiujara asembleo de Venezuelo E-Asocio. La Ĝenerala Sekretario de la Asocio J.E. Bachrich informis al la kunvenantoj pri la agado de la asocio laŭlonge de la jaro kaj substrekis la kunlaboron de A.V.E. kun Internacia Esperanto-Instituto por la realigo de Esperanto-kurso per televido, uzebla en ĉiuj landoj. Oni pretigas nun la eldonon de la romano por junuloj "Kumeaŭa" de Tibor Sekelj en la hispanlingva traduko far de d-ro Guillermo Alfredo Cook, kaj oni tradukas verkojn al Esperanto pri Simón Bolívar, Liberiginto de Venezuelo, kaj Poemaron de Venezuelo la Poezio. Fernando de Diego informis pri sia fortostreĉa laboro en la verkado de nova kaj pli kompleta vortaro hispana-esperanta kun vortoj el ĉiuj partoj de la hispanparolanta mondo. La koncernaj responsuloj pri Financoj kaj la fondaĵo Fundaesperanto ankaŭ informis pri siaj respektivaj taskoj kaj atingoj. Je la fino de la asembleo oni elektis novan estraron por la periodo 1994-95. Oni reelektis profesoron J. C. Monsonyi kiel prezidanton kaj en diversaj postenoj: Andrés Turrisi, J. E. Bachrich, G. A. Cook, E. Pérez, Yuri Yakimes, Fernando de Diego, F. García, A. Portillo, E. E. Monsonyi, Florinda Rossen kaj prof. Juan Negrete.

Omaĝe al la forpasinta Inés Gastón

En 1959, Salvador Gumà partoprenis kun Inés Gastón en la 44a UK (Varsovio), kaj, surprizita de ŝia organiza impeto, li dediĉis al ŝi ĉi poemeton:

Post la kongreso en Varsovio

Post longa vojaĝo
kun granda kuraĝo
Polujon ni venis;
amikojn ni vidis,
ni ŝercis kaj ridis
kaj ĝojon en koro ni tenis.
Kaj en la vagonoj
aŭdiĝis la sonoj
de lingvo ne tre, tre racia;
sed inter la poloj
kaj multaj popoloj
nur sonis la internacia.
Kiel bona patrino
INÉS, ĝis la fino
zorgis pri ĉio tre lerte;
ŝi ĉion aranĝis
kaj se ni do manĝis,
dankon al ŝi, tute certe!
Kaj pri la biletoj,
ekskursoj, pripetoj,
ĉiam ŝi mem planis ĉion;
ni, zorgojn ne havis,
ŝi, ĉiam nin savis
kaj priforgesis nenion.
Monstraĵojn ni tuŝis,
homsentoj nin puŝis
al pensoj pri homa malbono;
pro kio, detruu,
kulturon forskui
kaj regi satano sur trono?
La suno rebrilos,
la birdoj retrilos



en tiu Pollando tortura;
kaj per Esperanto
resonos la kanto
al vivo pli sana kaj pura.

Salvador Gumá (19-8-59)

Konversacio en esperantista hejmo

Ĝia moŝtino la litero "n"

—Nu, kion ci faras ĉi tie? Kie estas moŝtino "N"? —Mi diris preskaŭ krie.

Mia edzino, kiu troviĝis en la kuirejo preskaŭ alarmita demandis min:

—Kio ja okazas al vi? Nu, —ŝi aldonis— sendube tiu moŝtino "N" estas iu sinjorino de tiu japana filmo, kiun vi spektas nun, ĉu ne?

—Ne, absolute ne! —mi respondis, kaj tuj mi aldonis— Temas pri tiu fama litero de Esperanto nomata "N"...

—Sed, kia estas tiu "N"? —ankoraŭ insiste mia edzino min demandis.

Mi do devis ŝin klarigi, ke temas pri la litero "N" indikanta en Esperanto la akuzativon.

—Ho, ve! —klamis mia edzino, —tiun moŝtinon "N", kiel vi ĝin nomas, ankaŭ mi malfacile komprenas.

Mi relegas ĉi artikolon mem kaj jen, preskaŭ mirakle, mi trovas moŝtinon "N" en certa loko kie ĝi ne rajtas troviĝi.

—Nu, kion ci faras ĉi tie, kaj kial ci estas kie ci ne devas esti? —mi demandas ĝin, sed moŝtino "N" restas tute trankvila rigardante min kaj respondas nur per silento miajn demandojn.

Nur mia edzino rompas la silenton per spontana rido. Ŝajnas ke mi devas interpreti tiun silenton kiel akuzon, ĉar ne alion signifas la silento de moŝtino "N". Oni dirus, ke ĝi klare respondas:

—Ne, mi ne kulpas, sendube estas vi la kulpulo. Kial do vi koleras kontraŭ mi?

Kun atento mi legas kaj relegas la tekston skribitan kaj intime mi pensas: "Ne estas eble, ke mi metis cin en tiun lokon, ĉar mi bone scias, ke tie ci ne devas esti... Kaj eĉ ŝajnas, ke ĝi ridetas kaj mokas min..."

—Bone —mi fine diras, —mi promesas cin, ke estonte mi pli atentos kaj moŝtino "N" troviĝos en la ĝusta loko, kie ĝi devas esti.

Sed la mokema "N" daŭre silentas, eble ĉar ĝi tute ne kredas mian promeson kaj eĉ devas pensi ke mi falos denove en tiun kaptilon en kiun

falas multnombraj malzorgemaj esperantistoj. En aliaj kazoj, okazas male kaj mi demandas min sufiĉe laŭte, kien oni devas meti ĝin? Ĉu eble ĝi estas kvazaŭ birdo kaj forflugis oni ne scias kien? Ĉar, fakte, ĝia neĉeesto ankaŭ pensigas min kaj mi min demandas ĉu eble iu ajn bojkotas min...

Denove mi ne ricevas respondon.

Kaj poste venas trankvila kaj serioza rezonado:

-Nu —mi diras,— mi bone scias ke tiu diabla litero "N" devus troviĝi ĉi tie kaj ne alie.

Bedaŭrinde restas en mi ankoraŭ la dubo, ja ekzistas tiu miskompreno inter litero "N", ĝia ĝusta loko kaj mi. Estas kvazaŭ triangula ludo. Kiom da kapdoloroj donas al mi tiu perfida litero "N"!

Jam fariĝis por mi deviga tasko, kiam mi legas propran tekston en Esperanto serĉi, se necese per lupeo, kien oni devas meti aŭ ne moŝtino "N". Mi bone scias, ke multaj esperantistoj tute ne ŝatas tiun literon, kaj ne akceptas ĝin kiel amikino. Mi ankaŭ scias, ke aliaj esperantistoj fariĝis spertuloj pri ĉasado de tiu turmenta litero "N", kaj havas specialan ĝuon kiam ili ĉasas unu el tiuj dupiedaj bestetoj en loko kie ĝi ne devas troviĝi... Ho, kiel ili ĝojas en tiuj kazoj! Sed tio estas afero jam sufiĉe konata en nia ronda familio.

Sed...ĉu eble vi, moŝtino "N", rekonsideros mian promeson atente rigardi cian ĝustan lokon kaj kredos min? Estu certa do, ke estonte mi ne permesos cin vagadi senorde tra miaj tekstoj!

Luis Serrano Pérez

La ĝemelaj radikoj "spekulaci-" kaj "spekulativ-"

Esperantologoj difinas ĝemelajn radikojn en Esperanto kiel vortojn, kiuj devenas de la sama praa fontradiko. Post modifoj, kiujn tiuj leksikaj elementoj ricevas en diversaj etnolingvoj, ili fariĝas la etimoj de Esperantaj vortoj. Pro sia komuna deveno, tiuj vortoj similas inter si laŭforme kaj ankaŭ certgrade semantike. Sekve, ili prezentas malfacilaĵojn por lernantoj de Esperanto, kaj eĉ plurjaraj uzantoj de la lingvo stumblas ĉe ili. Ilustras tiun fenomenon ne nur vortparoj kiel "leter-/liter-" sed ankaŭ triĝemeloj (senc, sens-, sent-) kaj eĉ kvarĝemeloj (pulvor-, pulv-, polv-, pudr-).

Insida paro estas la ĝemelaj radikoj "spekulaci-" kaj "spekulativ-", ambaŭ el kiuj devenas de la latina verbo *speculare* "observi, serĉi, ekzameni". Legu

la sekvajn frazojn kaj decidu, en kiuj estas ĝuste uzataj la radikoj "spekulaci-" kaj "spekulativ-".

1. "...la kosmologio espereble trovos pli da kontrolo pere de observrezultoj tie, kie ĝi hodiaŭ devas apogi sin sur spekulacioj".
2. "...la kompara esperantologio nur tiam atingas fidindajn kaj valorajn rezultojn, se ĝi ne kontentigas pri teoriaj spekulativaĵoj".
3. "La spekulacio estas bazita sur la taksado de la evoluo de la merkato".
4. "La opinio, ke la homa pralingvo estis izola, estas spekulacia"...
5. "Pri tio la filozofoj povas nur spekulativi per hipotezoj".

Frazoj 1 kaj 4 estas eraraj; en 2, 3 kaj 5 troviĝas la ĝustaj vortformoj. La difino de "spekulativi" estas: koncepti surbaze de pura teoria rezonado, celante nur la scion, sen ia ajn praktika utilo. Ĝi estas uzata en filozofiaj kuntekstoj. "Spekulacii", male, rilatas al financaj kaj komercaj aferoj: investi monon aŭ fari negocon, esperante profiton aŭ riskante perdon, kiu dependas ne de la entreprenanto, sed de varioj de la kurzoj aŭ prezoj. Ĝi troviĝas en tekstoj temantaj pri ekonomiaj aferoj.

Sinonimo de "spekulaci-" estas la mallongigita radiko "spekul-"; en la sekva frazo aperas substantita formo.

"... la perantoj en ekonomio estas unue la komercistoj, la sistemaj, profesiaj spekulantoj, kies arto estas "aĉeti" varojn, produktojn per la minimuma "prezo" ...por "vendi" per la maksimuma prezo"...

Aparta malfacilaĵo prezentiĝas al esperantistoj, en kies gepatra lingvo la sama vorto havas ambaŭ signifojn, ekzemple hispana *especular*: 1. *reflexionar* = spekulativi; 2. *traficar* = spekulacii.

Bernard Golden

Zamenhof-tago

Al nia Redaktejo venis multaj informoj pri la celebrado de tiu tago: Katalunoj tion faris en Premià de Mar, aragonoj en Casino Mercantil de Zaragozo, murcianoj en Alquerfás, kantabroj en restoracio Bahía Herbosa de Santander, madridanoj en Hotel Puerta de Toledo, ankaŭ valencianoj kaj membroj de aliaj grupoj aparte festis ĉi tagon.

Universalismo, naciismo kaj esperantismo



La okazintaĵoj en Centra kaj Orienta Eŭropo malfermas eblan aktualan debaton pri la antitezo Universalismo-naciismo.

Post la dua mondmilito, oni pensis, ke la solvo por ke nova mondmilito neniam reokazu estas la Internaciaj Organizoj, esencaj por la internaciaj rilatoj, kaj tial oni kreis la Unuiĝintajn Naciojn. En la sesdeka jardeko, kiam multaj ekskolonioj sendependiĝis, ili tuj kreis sian propran ŝtaton-nacion kaj membriĝis en la U.N. por garantii sian suverenecon. La ŝtatoj tiel naskiĝintaj gardis la nomon "ŝtato" aŭ "nacio", kvankam multaj el ili ne posedis difinitajn trajtojn de vera ŝtato-nacio, nome saman etnon, saman lingvon, saman kulturon aŭ komunan historian pasintecon.

Por iĝi ŝtato, oni bezonas nur tri elementojn: teritorion, loĝantaron kaj registaron; la Internacia Juro aldonas kvaran elementon, sendependecon, por esti subjekto de Internacia Juro kaj membro de la Unuiĝintaj Nacioj. Kontraŭe nacio, signifas identecon rilate lingvon, rason, kulturon ktp. Pro tio, nun ni konstatas, ke la plej granda parto el la ŝtatoj estas, tamen, multnaciaj, ĉar ili kunigas diversajn naciojn en sia sino.

Post la dua mondmilito, diversaj nacioj iĝis devige kunfandi en ununuran ŝtaton. La Internacia Juro postulas, ke la koncepto pri ŝtato estu la bazo kaj la vera subjekto en la internaciaj rilatoj. Hodiaŭ oni trovas fortajn reagojn kontraŭ tiu koncepto, ne nur en Eŭropo, sed en la tuta mondo; la naciismo refloras, kaj eĉ la regionoj petas ludi sian propran rolon ene de la ŝtato kaj de la internaciaj organizoj. Tamen, ĉiuj konscias pri la bezono aparteni al supernaciaj organizoj kaj pri la graveco de la interdependeco en la aktuala mondo, jam transnacia, en ĉiu kampo: ekonomia, politika, kaj eĉ por la ŝirmado de la hommedio.

Oni povas diri, ke en la aktuala mondo oni trovas du kontraŭajn sentojn. La malpli evoluintaj landoj defendas nepre la suverenecon de la ŝtato, dum aliaj pli evoluintaj komencis transdoni parton el sia suvereneco al internaciaj organizoj. Ekzemplo pri tio estas la Eŭropa Komunumo (E.K.).

Oni povas konstati, ke ekde 1951 kaj 1957, la E.K. prenis parton el la suverenecaj agpovoj de siaj membroŝtatoj en diversaj difinitaj kampoj, ĉefe ekonomiaj; sed nun, kiam oni planas la politikan union pere de la Traktato de Maastricht pri la Eŭropa Unio, la problemo ekfloras. La lasta nea referendumo

mo de la traktato okazinta en Danio estas vera pruvo pri la timo de kelkaj membroŝtatoj, kaj ĉefe de ties loĝantaro; perdi politikan suverenecon.

Aliflanke, ene de ĉiu ŝtato, la regionoj petas ludi sian propran rolon. Tial la Traktato de Maastricht kreis novan organon, la Regionan Komitaton, por ke la diversaj regionoj povu esprimi siajn dezirojn ene de ĝi.

Se ni konsideras, ke esperantisto estas ĝenerale homo kun malfermita sinteno, kiel do povas kunekzisti ideo pri internacieco kun naciisma sento? Ĉu eble pro la fakto ke Esperanto povas esti bona kaj taŭga ilo por disvastigi iliajn naciismajn ideojn?

Dum multaj jaroj, kaj tion ni aŭdis kiam ni komencis studi la internacian lingvon, oni uzis la devizon: "ĉiu kun sia propra lingvo kaj Esperanto por ĉiuj", kaj tiu ĉi frazo estas baza por parolantoj kies denaska lingvo estas neŝtata. Tamen, kio povus esti por multaj kontentiga solvo, reale ne estas tia, ĉar la esperantoparolanta komunumo ne estas granda, kaj konsekvence, estas nur du solvoj: ĉu uzi la nacian lingvon kaj resti izolitaj, ĉu uzi la ŝtatan lingvon komunan por la tuta ŝtato.

Krom tio, ne nur la naciaj, sed la ŝtataj lingvoj grave suferas nun la influon de la uson-angla lingvo, kio kaŭzas la perdon de la kulturaj valoroj tiel de la naciaj kiel de la ŝtataj lingvoj.

Kiam la koncepto pri "ŝtato-nacio" dekadencas, oni devas rememori ke ne ĉiam la ŝtato estis la centro de la internaciaj rilatoj. Ni rememoros la koncepton pri "Intergenta Juro" proklamita de la internaciistoj de la 15a kaj 16a jarcentoj (Vitoria, Grotius ktp.) kiam la ŝtatoj ankoraŭ ne rolis kiel nun en la internacia sfero. Tiu intergenta juro formiĝis kaj defendiĝis pensante pri la diversaj nacioj kaj ĝiaj propraj trajtoj, sed kunfanditaj en internacia sento, multe pli homa ol la nuna.

Hodiaŭ neniu nacio povas resti izolita. La Internacia Juro, kiu certe estas nun "interŝtata juro", en kiu kune kun la ŝtato ludas gravan rolon la internaciaj entreprenoj kaj la internaciaj organizoj, repensas pri la estonteco.

Kia estos la historio je la komenco de la 21a jarcento? Ĉu la regionoj kaj nacioj trafos la kunvivadon kun la koncepto ŝtato?

Certe la nacioj kaj la ŝtatoj devos kune agadi, sed ene de supernacia restrukturado de la mondo, ĉiam agnoskante ĉies diversecon kaj propran kulturon.

M.R. Uruëña / Luis Hernández

la ŝulca lingvo

Ho legemulo, kiu komencas legi ĉi tiun artikolon: ĉi-sekve mi ne parolos al vi pri la bona lingvo de Piron aŭ la danĝera lingvo de Lins, sed pri la ŝulca (aŭ paderborna) galimatio, kiu, ĉu bonŝance?, nek bonas nek danĝeras.

En la numero 1992/3 de la literatura revuo *Itis-Forumo* aperis mia recenzo pri la rakontaro *Banalaj historioj... - Rakontoj el la vivo*, de Aleksandro Ĉerskjo, el la germana tradukita de Rikardo Ŝulco, kaj eldonita de Blajfhero en 1991. Mi ripetu nun la plej evidentajn mankojn, kiujn mi trovis en tiu verko.

Unue, Rikardo Ŝulco uzas multajn vortojn, kies signifojn li nenie klarigas: maĥorko [p. 13], rubaŝko [13], tovariŝĉo [19], sentimento [37], slofokso [97], atrakciaj [99], buzeno [112], pseŭdoantike [128], vehementan [133].

Due, li stumblas pri (ne)transitiveco de verboj (konvinkigus [18], seniluziitaj [68]): "La ĉapitro pri la diplomatio de la deknaŭa jarcento iel malinteresiĝas [29]." "Ke tie, li diris, nur nun komencas la fakte lasta batalo de la Judoj pro propra lando [126]."

Trie, li misuzas vortojn: kiloj [131] (anst. kilogramoj; kial ne anst. kilometroj? kio pri ŝipaj kiloj?), kondukto [141] (anst. dukto, konduk-tubo).

Kvare, li ŝanĝas la tradiciajn ortografion kaj signifon de vortoj, ekzemple: Israelujo anst. Israelo; Palestenujo kaj palestenoj anst. Palestino kaj palestinaĵoj; Varsovio apud Varŝavo.

Kvine, li neniam uzas la vorton "sia" post prepozicio komencanta prepozician priskribon de o-vorto: "Li suprenigas la kolumnon de lia eluzita vintromantelo, tiras la ĉapon sur la frunton [26]." "Ariko sidis ĉe la lito de lia patrino [50]." "Ariko eksciis la veron pri la vivo de lia patrino antaŭ sia naskiĝo [50]." "Timida, retenema, blonda, bluokula kaj altakreska junulo pene portas kun si en la estontecon siajn memorojn, sian solecon kaj la tragedion de lia vivo [52]." Komparu kun "sian vivotragedion".

Sese, Ŝulco strange transformas rektan parolon en nerektan: "[...] nur nun li konsciiĝis, ke li estis libera [...] kaj ke li estis nur dekokjara [81]." "[...] kvankam ŝi sciis, ke mi estis Juda infano [117]."

Kaj, sepe, Rikardo Ŝulco verkas ne en *esperanto*, sed en *estanto esperanta*. Se mia absoluta malrekomendo de lia fuŝa traduko ankoraŭ ne dekonvinkis iun, li aŭ ŝi provu ĝui la tri jenajn perlojn:

"Adamo estis obsedita per ĥaosaj kaj malesperaj pensoj. Estis estinte senpripense lasi la ŝuojn kaj la lanokovrilon en la barako, kvankam la ĉambrestro estis certiginta esti atentema [10]."

"Doktoro Ŝtajno estis mirigata, ĉar li ne sciis, ke lia pacientino estis kaŝinta al sia filo sian zorgon kaŭzantan farton. De semajnoj jam ŝi estis de li kuracigata. Ariko estis forte emociata, kiam la kuracisto parolis al li viralvire kaj urĝe rekomendis, ke la patrino de Ariko estu senprokraste kondukota en la malsanulejon [50]."

"Tri monatoj estas pasintaj, de kiam mia patro estas mortinta. Korinfarkto. Neniam antaŭe li estis estanta malsana, li estis modesta, silentema homo, ŝtata oficisto, kiu de antaŭ dek kvin jaroj estis praktikanta triarangan postenon [72]."

Resume kaj konklude mi finis la recenzon per la jena poemo:

Banala rimportreto

*Rikardo Ŝulc', tradukantanto
kun lingvosent' kaj discipleno.
Verkojn sen klara origeno
revekis li en Esperanto.*

*Formortis ĉia eleganto,
ĉar ĝin oferis al doktreno
Rikardo Ŝulc', tradukantanto
kun lingvosent' kaj discipleno.*

*Logiko en enorma kvanto -
jen la doktreno, la desteno.
Estas veninta al kulmeno
de lia lingvovarianto*

Rikardo Ŝulc', tradukantanto.

Poste, en *Speciala Cirkulero 62*, kiu difinas sin *la forumo de la Fundamentkonforma Esperanto (Analiza skolo)*, Rikardo Ŝulco represigis mian recenzon, al kiu li aldonis respondon pli longan ol la recenzo mem, laŭ sia kutimo. La tono de lia teksto, malgraŭ plumpe maska afablo, estas ataka kaj agresiva. Nu, ankaŭ mi respondis dirante, ke li ne volas kompreni, rifuzas kompreni la argumentojn de mia kritikisto, kaj ke en tio lia konduto treege similas tiun de malateistoj. Mi do ripetis ankaŭ la kernon de mia reago.

Ĉi-kaze lia nova zeŭso (minuskle!) havas propran nomon: Logiko. Kontraste, kiel Zamenhof kaj multaj aliaj esperantistoj, ankaŭ mi ne interesiĝas pri lingvo absolute logika. Eĉ pli: mallogikeco kaj nelogikeco logas kaj ĉarmas min; mi trovas ilin necesaj, dezirindaj kaj neeviteblaj en certa kvanto (kiun ne eblas mezuri) en ĉiu ajn lingvo kaj do ankaŭ en esperanto.

Tio sufiĉas, por ke mi restu heterodoksa, hereza kaj perfida el la vidpunkto de sinjoro Ŝulco, kaj de liaj obeemaj kaj incensemaj ŝulcistoj. Kiel malateistoj ĝenerale, ili kredas sian kredon la sola prava kaj vera - tamen ili bonvolu permesi, ke mi ne konsentu, kaj ke mi plu asertu, ke Ŝulco vane trompas sin mem.

Ĉar en nia kara lingvo esperanto estas multaj nelogikaĵoj. Ekzemple, la Fundamenta Gramatiko klare diras, ke la adjektivo finiĝas per a. Kaj jen ni havas la nevarian adjektivon *ambaŭ* (uzeblan ankaŭ pronome), kiu kontraŭas la Fundamentan Gramatikon! Simile, laŭ lingva konvencio, la senpera substantivigo de la participoj signas ne *kvaliton*, kiel tion postulus ilia adjektiveco, sed *personon*, kio havas nelogikajn sekvojn ĉe la pluformado. Ankaŭ vortoj kiel *terpomo*, *movado*, *denove*, *fervojo* kaj eĉ la ŝulcismo *regurbo* ne estas (miaopinie) plene logikaj.

Fakte la esperanto de *Speciala Cirkulero 62* estas nek fundamenta nek zamenhofa. La adjektivo *fundamentkonforma* eŭfemisme provas maski kaj mildigi, ke temas pri esperanto *ne plene fundamenta, korektita kaj modifita, reforma* eĉ (kvankam kontraŭflua). Al sinjoroj Ŝulco, Bermano kaj al aliaj ŝulcistoj simple ne plaĉas la ĝisnuna esperanto de niaj plej gravaj aŭtoroj, oratoroj, aktivuloj kaj malkomencantoj. Anstataŭe ili preferas sian propran, kaj do konscie dialektan aŭ almenaŭ origine idiolektan, varianton de ĝi. Por pruvi mian aserton mi citos ĉi-sekve el la respondo de Ŝulco al mia recenzo kaj el aliaj artikoloj en lia incensujo, t.e. en *Speciala Cirkulero 62*:

Unue, kiam li korektas *tiel bone* al *tiom bone* (p. 4), li ne diras, ke en la Fundamenta Ekzercaro (# 10, 21) legeblas i.a. jenaj modelaj ekzemploj: *Mi estas tiel forta, kiel vi. [...] Vidante, ke ŝi estas tiel bela [...]*.

Same, kiam li korektas *ĉi tiu* al *tiu ĉi* (p. 4), li ignoras la klarigon en la Ekzercaro (# 30), ke *ĉi tiu* egalas al *tiu ĉi* kaj *ĉi tie* al *tie ĉi*.

Same pri majuskloj (p. 4, 7). Oni komparu kun la Ekzercaro (# 40): *La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo*. Ekzemple, la vorton *esperanto* ne ĉiu skribas per majusklo. Mi skribas ĝin minuskle, samkiel la vortojn *volapuko*, *sanskrito* kaj *latino* (*Proverbaro Esperanta*, n-roj 691 kaj 2535). La argumento de Ŝulco, ke esperantaj radikoj ne devus ŝanĝiĝi ortografie tute ne estas logika: li mem ŝanĝas ortografie kiun ajn radikon komence de alineo aŭ tuj post frazo-fina punkto. Krome, parolante oni bezonas nek minusklojn nek majusklojn. Ĉu ne pli logikas la sistemo de nia japana kolego ludovikito (t.e. tute ne uzi majusklojn)? Aŭ ĉu parolante oni svingu verdan flageton por signi, ke temas pri la tiel grava majusklo vortkomenca?

Same pri nerektaj paroloj (p. 10). Se li simple transprenis la nerektajn parolojn tute tiaj, kiaj ili troviĝas en la germana originalo, li povintus transpreni ankaŭ la nemalhaveblajn substantiv-komencajn Majusklojn *usw.* Tio pravas, ke lia esperanto nur duone estas vere esperanta, ĉar subkuŝe ĉiam troviĝas la Diamanta Logiko de la Lingvo Germana. Ĉu Ŝulco do ne legis la

Fundamenton, konkrete la Ekzercaron (# 21): [...] *Vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras [...]*.

Same, kiam li korektas *multekosta* al *multakosta* (p. 4). Plu samlibre (# 15): *multekosta ŝtono*.

Same pri posesivoj. Mi ne komprenas, kial ŝulcistoj, el la du samsignifaj frazoj «*li portas kun si sian vivotragedion*» kaj «*li portas kun si la tragedion de sia vivo*», opinias nur la duan erara kaj obstine ŝanĝas ĝin al «*de lia vivo*» (p. 10) nome de ia preterhoma kaj supernatura logika interrilato, kiu kontraŭas ne nur mian lingvosenton, sed ankaŭ tiun de Zamenhof mem. Refoje en la Ekzercaro (# 12, 32): *Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj. [...] Ili vidas la suferojn de siaj najbaroj*.

Same pri *Staleno* (p. 4), kiu, logike, devas signifi nenion alian ol *eno*, *interno de stalo* (se ne paroli pri tio, ke *stalinismo* pli konformas al la 15a regulo de la Fundamenta Gramatiko, ol *stalenismo*).

Same pri lia manio kondamni la tradician paron *ĉefo - ĉefa* (p. 4), analogan al la paroj *giganto - giganta* kaj *nano - nana*. En la bonega konsultlibro *Zamenhofs Ekzemplaro*, de Riĥej Nomura (eld. Nagoja Esperanto-Centro, 1989), troveblas ses ekzemploj de zamenhofs neŝulca uzo de la adjektivo *ĉefa*. Cetere, mi tre dankas publike s-ron Yosikatu Nagase, kiu tre afable donacis al mi la menciitan verkon.

Same pri lia malpermeso verbigi adjektivojn senpere (p. 3, 8). Unue ni vidu, al kio ni venas per la eminente logika t.n. analiza vojo: kiam oni diras «*la domo estas granda*», tiam temas pri *estanta granda domo*, kio estas mem nek pli nek malpli fuŝa formo ol la arbitre atakita *grandanta*. Due, se la finaĵo *-i* povas signifi nur *agi*, sed neniam *esti*, kiel do Ŝulco klarigas la absolute mallogikan kaj kontraŭlogikan fakton, ke la verbo *esti* mem finiĝas per *-i?!* Jen kial liaj ĉi-temaj preferoj estas kaj restu nuraj preferoj. Persone mi tre ŝatas verbigon de ĉiaj radikoj, ĉar mi sentas ĉi tian verbigon tre intime esperanta. Mi rekomendas al oni (re)legon de la tre interesa verketo *La senpera verbigo de adjektivoj*, de H.A. de Hoog, en kiu klare legeblas i.a. (p. 7):

«En Ekzercaro # 7 ni jam trovas: *Kiu kuraĝas rajdi sur leono?* Kaj en la sama paragrafo Zamenhof difinis *kuraĝ'* kiel adjektivon! La signifo de *kuraĝi* nepre ne povas esti alia ol: *esti kuraĝa!*

En Ekzercaro # 42 Zamenhof mencias la vortojn *sani* kaj *malsani* kaj eĉ la imperativon *sanu*, kiu ja certe ne povas signifi ion alian ol: *Estu sana!*»

Resume (post tiom da *same!*): ke Ŝulco nomas tion *fundamentkonforma* *esperanto* estas false kaj malhoneste. Tial mi miras pri la abundo da absolute plej fidindaj laŭdoj pri *La Muzino* kaj pri la talento de ĉi ties aŭtoro en lia paderborna incensujo (antaŭe mi kredis tion apartaĵo de *Literatura Foiro*, sed mi devas konfesi, ke Bermano kaj K-io abisme superas ilin ankaŭ ĉi-kampe). Mi ege bedaŭras, ke siatempe li sendis donace al mi la apenaŭ digesteblajn (por mia lego-stomako) *Sur la vojoj de la Analiza Skolo* kaj *Pledo por unueca lingvo*, anstataŭ la ne nur kostega, sed oniskribe ankaŭ valorega kaj majstra *La Muzino!* Ĉar mi ja recenzas ne antaŭjuĝe, sed nepre ĉiam postjuĝe - kiel indas kaj endas kaj decas.

Tial mi tre domaĝas la monon, kiun ŝulcistoj uzos por aperigi lian logikan 400-paĝan *Legolibron*, kiun mi supozas verkita en tia (ni parolu sen eŭfemis-moj) *fundament-transforma*, *-deforma*, *-misforma* kaj *-reforma* *esperanto*. Finfine, kion li proponas? Nur la mimoan, la ŝulcan *esperanton*. Sed li bonvolu permesi, ke mi preferu kaj elektu la zamenhofan, almenaŭ tiom, kiom plaĉas al mi.

Fine mi aldonu (laŭ sugesto de anarkiema amiko), kaj kiel Ŝulco mem skribis pri la propraj nomoj (p. 10), ke ekzisto de diversaj interpretoj de pluraj eroj kaj aspektoj de *esperanto* *estas tute sendanĝera por sana evoluo de la lingvo*.

Georgo Kamaĉo

ATENTU!

Por aktualigi kaj kompletigi la HEF-datenaron ni bezonas helpon. Bv (foto)kopii la jenan slipon, kaj poŝtu aŭ

faksu ĝin al la HEF-oficejo, aŭ registru la respondon per la aŭtomata respondilo, aŭ telefonu nin marde aŭ jaŭde de 18-a ĝis 20-a. Koran dankon pro la helpo.

La HEF-Sekretario

Nomo	Familia nomo
HEF-kodo	Naskiĝdato
Unua jaro de membreco en HEF
Hejma telefonnumero (kun regiona prefikso)
Kategorio de HEF-membro (tabelo en Boletín 312, p.5)

Se via adreso sur la koverto de Boletín neĝustas:

Adreso
Poŝtkodo	Loĝloko

Se vi estas individua membro de U.E.A.:

U.E.A.-kodo	Kategorio de U.E.A.-membro
Unua jaro de membreco en U.E.A.

Malaga kongreso

Informoj pri loĝado

En la Kongresejo

Disponebblas nuntempe:

- 6 ĉambroj po 6 personoj = 36.
- 12 ĉambroj po 4 personoj = 48.
- 6 ĉambroj po 2 personoj = 12.

Prezo por unutaga restado kun 3 manĝoj: 2.550, ptajn.

NOTOJ: a) Tre eble antaŭ la Kongreso oni inaŭguros novajn ĉambrojn, kaj ni disponos litojn por 60 pliaj personoj.

Gastejoj (hostales)

A) Situantaj apud fervoja kaj aŭtobusa stacidomoj.

Ĉambroj 1-lita/2-lita/3-lita
Prezoj 1900 / 3200 / 4300

- HR La Hispanidad 231-11-35
similaj prezoj
- HR Galicia 231-38-42
- HR Las Tres Rosas 233-32-66
- HR Renfe 234-68-46
- H Antilla 231-43-88
- H Cristina 232-03-51
- H Terminal 231-82-00

B) Situantaj en la centro de Malago.

Ĉambro 1-lita/2lita/3/lita
Prezo 2000 / 3500 / 5100

- H Alameda 222-20-99
similaj prezoj
- H Andalucía 221-19-60
- H Costa Rica 221-35-77
- H Guerrero 221-86-35

- H Venecia 221-36-36
- HR El Cenachero 222-40-88

Hoteloj

A) Situantaj proksime de la fervoja kaj aŭtobusa stacidomoj

Ĉambro 1-lita/2-lita

Don Paco (231-90-08) . 5.080/6.678

B) Situantaj en la centro de Malago

- Lis (222-73-00) 3.500/5.565
- Niza (222-77-04) 3.500/5.600
- Casa Curro (222-72-00) 7.600/11.000
- Sur (222-48-05) 3.657/5.512
- Venecia (221-36-36) . . 4.080/5.520
- Málaga Palacio (221-51-85) . (****)

GRAVAJ NOTOJ

1) La Organiza Kongresa Komitato peras al kongresanoj nur la loĝadon en la Kongresejo (Centro Cívico). *Pri gastejoj, hoteloj kaj similaj la kongresanoj kontaktu ilin rekte kaj sufiĉe antaŭtempe.*

2) Eĉ se la kongresano ne loĝas en la Kongresejo, eblos manĝi en ties restoracio je tre favora prezo.

3) Por telefoni al Malago ne forgesu aldoni la prefikson 95.



Depósito Legal: Z-334-90
Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas